

La Esperanto-Gironde Informilo



JUNIO 2022

N° 168

Baldaŭa adiaŭo al kastelo Palmer



ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Espace Simone Signoret en CENON

la 23an de APRILO 2022

je la 11a



Ĉeestas: Janine Dumoulin, Martine Edelbloude, Gloria Gargallo, Klodin' Pomriol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Maeva, Rose Sarlandie.

Gastinoj el Ukrainio: Valentyna Gradzion, ŝia filino Katya, ŝia bofilino Jana kun ties sesmonata bebo Anna, .

Senkulpigataj: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Yannick Dumoulin, Christiane kaj Michel Jagueneau, Joël Lajus, Lucienne Laroche.

1. Translokiĝo de Esperanto-Gironde

Klodin': Devis okazi en marto kunveno de ĉiuj koncernataj asocioj kun Céline Dotigny, direktorino de la kulturfako de Cenon. Ĝi ne okazis kaj ŝi nun ferias.

Gloria: Skribis al pluraj urbodomoj sed ricevis ĉu neniun respondon, ĉu nean.

Klodin': Ricevis inviton al kunveno por plani Malferman tagon de la asocioj, sed Marcelo kaj Klodin' ne povos ĉeesti.

Marcelo: La asocio devas trovi mem solvon post la fermo de Palmer. La kultura asocio ne plu konsideras Esperanton kiel kulturalan aferon. Do Esperanto ne estas bonvena en la Domo de la asocioj. Estas salonoj, kiuj povas esti rezervitaj por unu aŭ alia tago, sed ne laŭ regula tago kaj ne por meti ŝrankojn. (Finfine estos loko en la Domo de la asocioj por unu ŝranko kaj por la kursoj, sed ne por la monataj kunvenoj.)

Klodin': Oni povas rezervi salonon por kunveni, sed ne ĉiam la saman.

Gloria: Kion decidi, se ni ne trovos lokon?

Marcelo: La lundaj kursoj povus okazi en la biblioteko de Cenon, sed ne estas loko por la vortaroj ktp.

2. Aliaj aferoj

(1) **Martine** ricevis retmesaĝon pri monhelpo por junulgastejo en Brazilo.

Ĉar estas neniu garantio pri la vereco de la prezentita situacio, estas decidite ne respondi.

(2) **Janine** donas novaĵojn pri Brassens: Yannick antaŭ du semajnoj sukcesis kontakti la du firmaojn (Universal kaj Warner), rete kaj telefone. Universal ja ricevis la dokumentojn kaj avertis, ke la respondo al nia peto ni povus atendi dum pluraj monatoj. Ankaŭ Warner konfirmis la ricevon de la dokumentoj, kaj la responsulino diris, ke ŝi sendos respondmesaĝon en la sekvanta semajno... Yannick estas daŭre atendanta ĝin. (En la momento, kiam ni redaktas tiun numeron, post pli ol du monatoj, neniu respondo alvenis).

Marcelo: Okazos la prelego en Trelissac vendredon je la 18a.

(3) Konversacio kun Valentyna

Ŝi estas instruistino pri lingvo kaj literaturo en mezlernejo, kaj instruas perrete dum sia foresto de Kijivo, de la 7a30 ĝis la 14a ĉiutage.

Katya eklernis la francan en la laborejo: ŝi laboris dum kelkaj tagoj en la entrepreno, kie Marcelo laboras.

Valentyna, Katya kaj Jana travivis administrajn malfacilaĵojn dum sia ekzilo. Ili devus atendi dum du semajnoj en Varsovio por senpage vojaĝi al Germanio. Efektive, Eŭropo decidis proponi senpagajn trajnvojaĝojn al la forfuĝantaj Ukrainoj, sed estas en ĉiu trajno limigita nombro de senpagaj lokoj, kiuj devas esti rezervitaj. Do ili elektis buson, kaj devis pagi por la vojaĝo. La fervojaj kaj aviadaj kompanioj pagigas kvaroble la prezon de la bileto (200 € anstataŭ 60 € per trajno, aŭ 600 € anstataŭ 120 € per aviadilo).



Valentyna kun Ana, la nepino



Marcelo, Katya, Jana

Marcelo kaj Klodin' aĉetis por ili la biletojn de Flexibus inter Varsovio kaj Berlino (poste repagitaj de Espéranto-Gironde). De Berlino al Parizo, ili veturis per senpaga trajno, rezervinte la lokojn.

En Parizo, ili estis akceptitaj de Guy Cavalier kaj Florence, en Rueil Malmaison. Ili devis serĉi, kiel havigi al si la oficialajn dokumentojn. La akcepteje por la Ukrainoj estas en stacidomo Montparnasse, ne en la ĉefa stacidomo sed en la aneksa, je unu kilometro piede. Nur post longa diskuto ili povis ricevi la senpagajn biletojn.

En Bordojo ili rendezuis kun la prefektejoficisto per la reto. Ili atendis dum tri semajnoj la rajt-atestilon, kiu validas por ses monatoj. Ili rajtas labori, sed ili devas malfermi bankokonton por ricevi la salajron. Unu banko rifuzis malfermi konton. La Banque Postale akceptis, sed oni devas atendi la konsenton de la estro.

Dank' al la atestilo de la prefektejo, ili povos ricevi ĉiumonatan monsumon de la franca ŝtato: Jana: 500 €; Katya kaj Valentyna: 700 €. Ili estos pagitaj ekde aprilo, sed la sumon de aprilo ili ricevos fine de majo.

Esperanto-Gironde subskribis konvencion kun SIREC por ricevi manĝaĝojn, kiuj estis ne liveritaj en la tago. La urbestro de Cambes donis 50 € kaj proponis vestaĵojn kaj ŝuojn, kaj ankaŭ vindaĵojn por la bebo.

Valentyna, Katya kaj Jana ornamis ŝildetojn laŭ ukrainaj koloroj kaj simboloj por disvendi profite al iu tia asocio, kia la Ruĝa Kruco por la Ukrainoj, kiuj restis en



sia lando.


Marcelo: Tiuj eventoj havis neatenditajn konsekvencojn. La prezidanto de SIREC, Ludovic Armoët, urba konsilanto de Cenon, proponis, ke Valentyna prezentos prelegon, kiun li pagos al ŝi. Tio okazos la 5an de majo en Espace Simone Signoret. Estos invititaj elektitoj de Ambares, Cenon, Floirac, kun oficiala tradukisto de la prefekejo. Honorvino estos proponita de SIREC.

La prezidanto de SIREC, proponis prezenti Esperanton kadre de asocio, kiu zorgas pri gejunuloj, kiuj spertas malfacilaĵojn. Li estas ano de amikaro de policistoj, kaj petis de Valentyna, ĉu ŝi povas rilatigi lin kun ukrainaj policistoj.

La 9an de majo, Marcelo estos invitita ĉe O2 Radio por paroli pri Esperanto.

Post la manĝo, Valentyna kaj Katya prezentis en Esperanto la prelegon pri Ukrainio (historio, nuna vivo kaj kulturo) kaj tiel pasigis al ni tre interesan kaj informriĉan momenton.

Ni tiel eksciis pri la historio de la lando, kaj pri la origino de la ĉefurbo, Kijivo. Ana Jaroslavna (france Anne de Kiev), ukraina princino, iĝis reĝino de Francio, ĉar ŝi edziniĝis kun la franca reĝo Henriko la 1a en 1051.



Ni povis ekkoni la tre delikatajn artaĵojn de Petrikiva pentrarto, el Dnipro regiono.



La kunveno finiĝis je la 15a 30.

La venonta kunveno devus okazi la 22an de majo en loko precizigota.

Janine

PRELEGOJ PRI *PACO EN UKRAINIO*

en la teatro Simone Signoret de Cenon

unue en Esperanto (23/04) kaj due en la ukraina (05/05)

Valentina tre timis prezenti en Esperanto al nekonata publiko sian prelegon pri ukrainaj historio kaj kulturo, kvankam la enhavon ŝi tre bone regas, tial ke ĉiujare ŝi ĝin prezentas al novgelernantoj komence de la studjaro. Ŝi adaptis por ni sian intervenon, kiun helpis esperantigi ŝia edzo Volodimir... el la batalfronto.

Tre bedaŭrinde tro malmultaj grupanoj ĉeestis nian kunvenon sabaton la 23an de aprilo. Tamen tiuj, kiuj ĉeestis, plene ĝuis la tre interesan prelegon prezentitan de Valentina sed ankaŭ de Katja, ŝia filino kaj ilustritan de Jana, ŝia bofilino.



Valentyna sub la rigardoj de Jana kaj Anna

La 5an de majo 2022 impulse de Ludovic Armoët, urba konsilanto de Cenon kaj prezidanto de la plururba kuirejo *SIREC*, la urbodomo de Cenon oficiale akceptis la familion Gradzion por prelego pri *Paco en Ukrainio*.

Kiam Ludovic Armoët proponis al Valentina prezenti al franca publiko ŝian prelegon pri Ukraina kulturo, ŝi tuj konsentis. Despli ke tiam ŝi parolos ukrainlingve (do sentime) kaj profesia tradukistino france simultane tradukos.

Malfermante la vesperon, Ludovic Armoët bonvenigis la oficialulojn, plus la kvardekon da ĉeestantoj (inter kiuj notindas pluraj kolegoj el la kuirejo, kiuj amikiĝis kun Katja) kaj ĉefe la familion Gradzion.

Jean-François Egron, urbestro de Cenon salutis la engaĝiĝon de la asocioj kunorganizantoj de tiu kultura vespero, kaj ankaŭ aparte Marcelon kaj Klodin' pro la gastigado de la familio Gradzion. Rose Pedreira Afonso, la urbestro de Cambes, emocie parolis estiel infano de enmigrintoj kaj trafe tuŝis nin, kiam ŝi konkludis, ke laŭ ŝi, **rilate tiun karan familion ni prefere ne parolu pri rifuĝintoj sed pri heroldoj.**



*Rose Pedreira Afonso, Jean-François Egron, Ludovic Armoët,
Oksana tradukistino kaj Valentyna Gradzion*

Dum tri kvaronhoroj Valentyna prelegis komentante belajn ilustraĵojn kun bela komplaceco de la flua traduko far Oksana, juna profesia tradukistino, ukrainino vivanta en Francio jam de kvin jaroj.

Sekve Katja en perfekta franca lingvo raportis pri sia sperto kiel helpantino en la plururba kuirejo, kie ŝi povis labori dum du semajnoj kaj duono, en tempo kiam pluraj profesiuloj mankis pro kronviroza malsano. Notindas, ke Katja parolis ne unu francan vorton antaŭ ol alveni fine de marto. Tre varmajn aplaŭdojn ricevis la prelegintinoj.



Interveno de Katja

A cause de la guerre nous avons dû quitter l'Ukraine. La route était difficile. Surtout pour Anna. Nous avons voyagé neuf jours. Deux jours plus tard Marcel m'a proposé un travail temporaire à son travail. J'ai été d'accord. Au début je me suis réveillée à quatre heures du matin. J'avais peur de ne pas connaître la langue. Je ne comprendrais rien. Je ne pourrais pas bien travailler. On me dirait de ne plus revenir. Mais là il m'ont attendu, m'ont accueillie dans leur équipe, m'ont offert de merveilleux cadeaux.

C'est une équipe très gentille et amicale. Le premier jour était très intéressant. Le lendemain matin je me suis encore réveillée à quatre heures parce que je voulais vraiment travailler. J'ai travaillé deux semaines. Cette période était comme un conte de fées. Très bonne équipe menée par un directeur merveilleux. Tout le monde voulait m'aider, m'a tout dit et me l'a montré. Surtout Émilie. Dès le premier jour elle m'a patiemment enseignée et m'a expliqué quoi faire. J'ai vraiment aimé travailler. Ici j'ai trouvé de nouveaux amis et nous avons marché ensemble jusqu'à la dune du Pilat.

Je tiens à remercier Marcel et Claudine de la part de notre famille de nous avoir hébergées, accueillies dans leur famille créant du réconfort.

Ma famille remercie chaleureusement Madame le Maire de Cambes pour l'accueil lors de notre rencontre et pour l'aide apportée.

Fine estis proponita por ĉiuj komuna manĝeto preparita de la kolegoj el la kuirejo. Tiu tempo ebligis esprimadon de gratuloj, dankoj kaj diversaj interŝanĝoj. Ekzemple kun Céline Dotigny, direktorino de la kulturfako de Cenon, pri la estonteco de Palmer, aŭ kun entuziasma paro el Talence, kiu proponis inviton por interŝanĝo kun ukrainaj familioj, gastoj ĉe la socia centro de la hospitalo Bagatelle. Sekvota afero...

Fejsbuka raporto de Ludovic Armoët

Beau moment d'échange et de partage lors de cette conférence organisée par l'association Thésée et soutenue par la GMF et la ville de Cenon sur le thème de l'art, la culture et la littérature en Ukraine. 3 générations de femmes ukrainiennes, la mamie, la fille, la belle-fille accompagnée de la petite fille de 7 mois, sont venues nous parler non pas directement de la guerre, mais du beau de ce pays et de ce peuple. L'art, la littérature, les cultures locales. Valentina, Kateryna, Yana et la petite Anna nous ont fait vibrer. Nous avons évoqué le beau car l'espace d'une soirée, l'espace de ce moment de fraternité, nous avons adhéré à cette belle formule de Carmen Sylva, ancienne reine de Roumanie : « pourquoi décrire le laid quand le beau n'est pas encore épuisé ? ».

Merci aux partenaires qui ont permis cette belle rencontre, la ville de Cenon et la présence de M. le maire, Jean François Egron et les élus, le Sirec et la GMF. Merci à madame Rose Pedreira Afonso, maire de Cambes, de sa présence et de son témoignage dont je reprendrai cette belle formule « Valentyna, Kateryna, Yana et Anna, vous n'êtes pas des réfugiées, mais des messagers de la paix, de l'universalisme, de la fraternité. »

De ce moment je retiendrai personnellement l'art de Maria Primatchenko, artiste peintre qui a mis en avant à travers ses productions « art naïf » la tradition populaire et les légendes ukrainiennes. Beaucoup de ses œuvres ont été détruites lors des derniers bombardements russes. Ainsi résonne cette prophétie d'Albert Camus : « Tout ce qui dégrade la culture raccourcit les chemins qui mènent à la servitude ! »



Maria Primatchenko – magie de l'art naïf d'un village *polissya* (région de Tchernobyl)



Fejsbuka mesaço de Rose Pedreira Afonso

Ce soir j'ai eu l'honneur d'assister à une conférence sur l'histoire, la littérature et l'art Ukrainiens.

Cette présentation a été faite par Valentyna, l'une de nos hôtes ukrainiennes à Cambes. Car Valentyna est professeur de littérature en Ukraine. Métier qu'elle continue d'exercer à distance (en visioconférence) pour des élèves dispersés partout en Europe.

Merci à M. Le Maire de Cenon Jean-François Egron, à M. Ludovic Armoët, au SI-REC, à leurs équipes, ainsi qu'aux associations *Thésée* et *Espéranto-Gironde*, qui ont offert une magnifique salle à Valentyna, lui permettant de mettre un peu de sens à l'insensé.

Rencontrer Valentyna et ses filles, c'est comprendre un peu mieux, ce qu'il se passe là-bas, mais c'est aussi apprécier ce qu'il peut se passer ici.

En somme, il n'y a pas de réfugiés lorsque l'on prend le temps d'échanger, et de s'ouvrir à l'altérité : il n'y a que des messagers.

PRI PACO EN UKRAINIO

DUM REKTA ELSENDO DE LA NOVAĴOJ ĈE O2RADIO



Ludoviko Armoët aranĝis intervjuon kun Joël GUTTMANN, animanto de la tagĵurnalo de la radio *O2radio*. Tiel la 3an de majo je la 12a estis intervjuitaj Ludoviko Armoët pri la celo de la prelego kaj precipe Marcelo pri la cirkonstancoj de la alveno de la familio Gradzion en Bordoza.

Dum kvaronhoro viglis interesaj interŝanĝoj, kie kompreneble Esperanto invitis sin.

La elsendo estis reelsendita la saman tagon je la 16a kaj restas plu aŭskultebla perrete.

Retalirebla elsendo. La temo ekde la 13a minuto ĉe:

<http://o2radio.ddns.net/o2replay/Emissions/JOURNAL D'O2 RADIO/JOURNAL MARDI 03 MAI 2022.mp3>

Marcelo



Valentyňa, Anna, Marcelo, Jana, Oksana (tradukistino) kaj Katja

ARKIVECA AKTIVECO EN PALMER

Lundon la 16an de majo 2022 la kutima rendevuo de la loka tradukrondo iĝis kunveno de Esperanto-Gironde kun escepta partopreno de Sino Charbonnier, reprezentantino de la Departementa Arkivofako. La celo estis montri la enhavon de la asociaj ŝrankoj cele al arkivado en la oficiala deponejo, tiel ke estonte iu ajn esploro havu aliron al la arkivoj de nia grupo.



Sekvan lundon la 23an de majo ne kuntraĉis la kutima rondo en Palmer sed konkrete eklaboris por kribri kaj listigi niajn riĉaĵojn. Ĉeestis Andreo, Klodin', Marcelo kaj... Jana kaj Katja. Tiuj du junaj volontulinoj tre efike kunhelpis por entabeligi la dokumentojn kaj librojn laŭ la postulata formato. Substrekindas la grava helpo, kiun alportis tiuj du ukraininoj registrante la da-

tenojn per sia poŝtelefono!

La afero organiziĝis bonorde kaj senpaŭze de la 13:30 ĝis la 17:30. Unue Andreo kaj Klodin' kribris la librojn kaj dokumentojn, kiujn la Cenona rondo transportigos en sian venontan kursejon. Verŝajne en la Cenonan domon de la asocioj. Konfirmote. (Maldekstra ŝranko sur la foto)

Cetere komenciĝis la plenigo de skatoloj per listigitaj arkivaĵoj, revuoj kaj libroj. Pli ol 300 jam troviĝas en 11 provizoraj skatoloj. Provizoraj, ĉar ne laŭ la postulata formato de la Arkivofako.

Post kvarhora intensa laboro la sentoj estis duecaj: ni kontentis pro la konstatata efiko (preskaŭ 300 registraĵoj) sed ankaŭ plu timis pro la restanta laboro en tro minimuma restanta tempo (mezo de junio).



Tiujn sentojn ni tiam esprimis al Annelise, la sekretariino de la kulturcentro. Kaj ŝi tuj trankviligis nin. Ja, ni pruvas nian bonvolemon kaj tial disponos pri kroma tempo en septembro por fini la arkivecan laboron. Jen bona novaĵo!

Tamen Esperanto-Gironde daŭre ne decidis, kion fari per la trezoraĵoj, kiujn ne akceptos la Arkivofako. Kaj ili estas multnombraj!

Kiuj forportos la skatolojn en septembro? **Kien?**

Nepras respondoj!!!



**La biblioteko de Esperanto-Gironde
senpage disponigas tricent librojn
- listo havebla -**

GRAVA ALVOKO! TREZORO SERĈAS RIFUĜEJON!

**Tuj reagu! Proponu vian solvon al
esperanto.gironde@free.fr**

Ĉu ledebinditaj revuoj, kiaj «Internacia Revuo» de la jaroj 1902-1903, finos en bordoza rubujo?

Ĉu nenium korŝirus definitiva malapero de

***La Gefratoj* de Goethe en ĝia frua eldono 1889?**

Ĉu *Boris Godunov* de A. Puŝkin, tradukita dramo en ĝia originala versio de 1894, estu en 2022 bruligita?

Marcelo

BRASENSO EN TRELISSAC LA 27AN DE MAJO 2022

Ravita publiko: bonvenon al novaj Kompanoj

Okaze de la Inter-asocia kongreso de Esperanto-France okazinta en Trelissac, Esperanto-Gironde estis invitita prezenti la kanton de La Kompanoj *Brasens en espéranto*.



Antaŭ atentoplena publiko (pli malpli sepdekopa), Marcelo disvolvis bildaron iom aranĝitan de post la aŭtunaj prezentoj en Bordoza, Parizo, Araso kaj Lillo.

La unuhora prezento en tre bona etoso skizis raporton de la rilatoj inter la verkoj de la kanzonisto kaj esperantistoj.

Prezentinte la tradukintojn, ja ne mankis anekdotoj: «Claude Piron estis fripono» kaj «Roger Bernard, unua tradukinto de Brasenso jam antaŭ ties famiĝo» kaj aliaj.

La Esperantista publiko restas kantema kaj apud Perigozo ĝi ankoraŭ fidele tion pruvis komune kunkantante la kelkajn proponitajn kanzonojn: *Kanto por la Kampul'* kun Olivier Tzaut, *Mortadi pro ide'* kun Ĵak Le Puil, *La marista amo* kun Ĵak Yvart. Notindas, ke tiu filmeto de Vinilkosmo estis aplaŭdita fine de la kanto. Kaj krome *Povra Marteno*. Varmaj aplaŭdoj ankaŭ kronis la konkludon. Kaj kun entuziasmaj komentoj, tuj poste multaj kantemuloj el diversaj regionoj aliĝis kontraŭ 15-eŭra kotizo al *La Kompanoj* kaj senpage ricevis la Brel-KDon kaj la kanton por kunkanti Brasenson. Ties dua centon eldonita tiel estas nun kvazaŭ entute elĉerpita.



Marcelo

NIA PARTOPRENO EN LA INTERASOCIA KONGRESO DE TRELISSAC

Ni partoprenis nur la du unuajn tagojn (ĵaudon kaj vendredon) kun JeanSeb, Annie kaj Karima. Bona etoso. Ĵaudon, ni vizitis Périgueux, kaj vespere ni aŭskultis interesan prelegon pri la groto de Lascaux (kiu estis la ĉefa temo de la kongreso) fare de Chantal Jègues-Wolkiewiz, antropologistino jam emerita, pri la ligoj inter la famaj prahistoriaj pentraĵoj kaj astronomio (kaj eĉ astrologio). Oni legis la prelegon en la franca, kun resumo en Esperanto, kaj fine de la prelego la prelegintino interrete respondis la demandojn sur granda ekrano. Interesaj demandoj: ĉar la fakuloj plu diskutas pri la dato de la pentrado de la groto, ĉu vere oni povas aserti, ke la ĉielo estis la sama inter -15000 kaj -25000? Ŝi respondis jes, ĉar ne la ĉielo ŝanĝiĝis, sed nur la steloj... Vidate de la Tero, la suno ĉiam leviĝas kaj subiras en la sama loko de horizonto, kaj la solsticoj kaj ekvinoksoj ĉiujare okazas je la sama dato. Ĉu la fakuloj konsentas pri tiu teorio? Ŝajnas ke jes, almenaŭ la plejmulto, diris la prelegintino... Ni eksciis, ke en 2007 ŝi estis intervjuita ĉe Arte pri sia libro *Le ciel étoilé de Lascaux*. Interesa prelego, ĉar mi neniam pensis pri tiuj rilatoj: ĉu la famaj surrokaj desegnoj de virbovoj kaj aliaj bestoj de la groto povas reprezenti la formojn de Lakta Vojo kaj aliaj stelaroj? Fascina ideo, ĉu ne?

Vendredon ni partoprenis en la oficiala malfermo de la kongreso, kun paroladoj de la organizintoj de la perigorda grupo, ĉefe Ange Mateo kaj Claude Labetaa, de la prezidanto de Esperanto-France Bruno Flochon, kaj eĉ, per ekrano, de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, forestanta pro kovimo... Ankaŭ ĉeestis du gravuloj de la Esperanta movado: Katalin Kovacs kaj ŝia edzo Sylvain Lelarge. Katalin disdonis premiojn pro aktivado en Esperantaj medioj, notinde al Bruno Robineau. Poste, dum la honorvino, JeanSeb afiŝis la Himnon al Eŭropo de Brocatelli en Esperanto (proponita por esti la eŭropa himno), kaj sukcesis kantigi la tutan ĉeestantaron, dank' al Morine (kiu speciale venis de Créon): ŝi donis la «la» (A en iuj landoj). Emocia momento, kaj tuj poste okazis kunveno de la EDE-anoj (Eŭropo Demokratio Esperanto), kies prezidanto, Pierre Dieumegard, prezentis novan retejon (europokune.eu): indas viziti ĝin!

Posttagmeze, ni vizitis la Kastelon des Bories, proksime al Trelissac. Belega kastelo, el



la mezepoko (la du rondaj turoj) kaj la Renesanco (la kvadrata turo, kiu entenas duetaĝan ŝtuparon). Estas la unua ekzemplo, kiel diris la gvidantino, de «loĝebla ŝtuparo» en tuta Francio. Fakte estas eta kapelo aranĝita en ĝi.

La gvidantino apartenas al la familio d'Astier de la Vigerie, kiu posedas la kastelon kaj loĝas la tutan jaron en ĝi. Tre entuziasma estis ŝi!

Ni revenis al la kongresejo, kaj ĉeestis la prelegon de Marcelo pri nia brasensaj tradukoj (vd. lian raporton p.12). Post franda bufedo, ni aŭskutis nian lastan prelegon, far la verkisto Christian Grenier, pri la rilatoj inter scienc-fikcio kaj prahistorio. Interesa, tamen laŭ mi iom tro «kataloga» kaj «enciklopedia». Li donis multajn titolojn kaj nomojn de aŭtoroj laŭ la kronologio, ktp. Pli interesa estis la diskuto poste. JeanSeb demandis pri la ofteco de lingvaj temoj en sciencfikciaj verkoj. La preleganto asertis, ke tiu temo estas ĝenerale traktita en tiuj romanoj, kaj menciis la verkon de Jack Vance, *Les langages de Pao*, en kiu la temo interkomunikado en aliaj mondoj estas tute kerna. Do, jen bona ideo por somera legado!

Aliĝis entute 121 homoj, el kvar landoj. Bedaŭrinde, ni devis reveni sabaton matene, kaj ne povis partopreni la sabatan programon. Ve! Ni maltrafis la koncerton de Jomo...

Notinde ke Claude Labetaa prezentis al mi sian E-lernanton, Nathan, kiu intencas studi la hispanan en la bordoza universitato! Li jam sufiĉe bone regas Esperanton, do mi tre ĝojas lernigi lin venontjare!

Jen ligilo al la artikolo aperinta en Sud-Ouest: <https://www.sudouest.fr/dordogne/trelissac/dordogne-venus-de-toute-la-france-pour-parler-esperanto-11077301.amp.html>



Elvezio kaj JeanSeb

La Dordogne rassemble autour de l'espéranto

Le congrès national interassociatif de l'espéranto, langue usitée dans le monde entier, se déroule à Trélissac (24) jusqu'à dimanche

Comment communique un Français en couple avec une Hongroise, alors que le couple vit aux Pays-Bas ? « En espéranto ! », plaisante Sylvain Lelarge. Avec sa femme Katalin Kovats (une espérantiste de référence au niveau mondial), l'homme à la moustache a parcouru les 950 kilomètres qui séparent La Haye, aux Pays-Bas, de Trélissac, en Dordogne, pour assister au congrès interassociatif de l'espéranto en France, qui se déroule d'hier à dimanche.



Claude Labetaa, Ange Mateo et Sylvain Lelarge. P. GREILLER / « 50 »

Préhistoire

Le pied à peine posé en Périgord, le couple s'approche d'autres espérantistes. Un « Saluton ! », prononcé dans un grand sourire, tient lieu de bonjour. « On est content de se retrouver, glisse Ange Mateo, le président du Groupe espérantiste périgourdin (GEP). Plus d'une centaine de personnes vont venir de toute la France. L'événement, célébrant cette langue construite internationale élaborée par Lazare Markovitch Zamenhof, devait se dérouler en 2021. Il n'avait pas pu être organisé à cause de la pandémie.

Cette année, c'est le thème de la préhistoire qui a été mis à l'honneur. Un pléonasme au pays de Cro-Magnon et de Lascaux, mais surtout un formidable prétexte pour faire découvrir l'espéranto au plus grand nombre. C'est le sens du concert du musicien toulousain JoMo, programmé demain à 20 h 30. « Il a déjà chanté en 25 langues, témoigne le vice-président du GEP, Claude Labetaa. C'est un espérantiste, mais aussi un occitaniste. »

Le reste du programme est truffé de conférences, de cours et de visites. Les espérantistes de France et de Na-

varre n'auront pas le temps de s'ennuyer. « Ce congrès, c'est toujours un moment fort, insiste Aleks Kadar, secrétaire général de l'Universala Esperanto-Asocio (UEA), l'association universelle d'espéranto. On compte plus de 600 membres actifs en France, mais cela n'est pas représentatif. Entre sept à dix millions de locuteurs parlent cette langue dans le monde. »

Clément Bouynet

La conférence organisée ce soir à 20 h 30 et le concert de JoMo sont en accès libre. Renseignements sur le site <http://esperanto-gep.asso.fr>


S.O. 27/05/22

ĈU LA PIRENEAJ GLAĈEROJ MALAPEROS ANTAŬ LA JARO 2050?

Pro klimata plivarmiĝo la pireneaj glaĉeroj konstateble reduktiĝis. Ili estus malaperontaj antaŭ la jaro 2050.

Tio ne plu estas alarma konstato sed nekrologo: «La glaĉero ĉe Arriel, la plej okcidenta sur Pireneoj, malaperis, samkiel 50% de la pireneaj glaĉeroj dum la lastaj jaroj. Ĉiuj probable malaperos antaŭ 2040.» Tion indikas tabelo fiksita en oktobro 2019 sur la rifuĝejo ĉe la pinto Arriel, post fandiĝo de tiea lasta glaciero. *In memoriam*.

Laŭ la glaĉerologo Pierre René la afero estas senrimeda kaj la pereiga scenaro neevitebla: «En la jaro 2050, konsidere la aktualan tendencon, estos tre malfacile ankoraŭ trovi glaĉerojn en Pireneoj, krom eble en kelkaj lokoj stumpojn taŭge ŝirmitajn piede de krutaĵoj. »



La asocio Moreno kontrolas la evoluadon de naŭ tipaj glaĉeroj el la dek kvin ankoraŭ restantaj en la francaj Pireneoj. De 2002 ĝis 2019 ilia areo reduktiĝis de 140 hektaroj al 79. La jaro 2019 registriĝas inter la plej mankohavaj. Por regeneri glaĉeron, necesas ke proksimume 60% de ĝia areo estu somerfine plu kovrita de neĝo. Tiu kompensas la fandiĝon kompaktiĝante en novan glacitavolon. Sed en 2019 nur 8%-n de la areo de la naŭ glaĉeroj ankoraŭ kovris neĝo en tiu sezono, kontraŭ 27%-n, averaĝo de dek ok jaroj da mezuroj. La fandiĝo estis aparte severa koncerne la glaĉeron Ossoue. Ĝi situas piede de Vignemale, plej alta pinto en Francio. Tiu plej vasta kaj plej studata glaĉero maldikiĝis je tri metroj en unu jaro.



Fandiĝo de la glaĉero Ossoue ĉe la pinto Vignemale.

Kiu ajn estas la scenaro de evoluo de temperaturoj dum la venontaj jardekoj, la sorto de la pireneaj glaĉeroj estas jam sigelita. «Eĉ se subite stabiliĝus la klimataj kondiĉoj, la glaĉeroj tamen iom fandiĝus kaj devus troviĝi pli alte por stabiliĝi», reliefigas Pierre René. Sur Alpoj ilia suba parto malaperos sed ili konservos glacian je alta altitudo.

Sur Pireneoj la marĝeno estas tiel subtila, ke stabiliĝo jam ne eblas. Fakte la reduktiĝo de la pireneaj glaĉeroj ne efikas sur la regionajn akvajn resursojn, (ĉar ili estas tro malvastaj) sed ilia fandiĝo kuntrenas perdon por biodiverseco, tial ke ilia glacio ŝirmas endemiajn mikro-organismojn, kiel la glacian pulon. Ĝi ankaŭ forviŝas tipajn pejzaĝojn.



La glaĉero Ossoue ĉe Vignemale en la jaro 2000

La glaciologo fundis la asocion Moraine (Moreno) en 2001 por plenumi la ĉiujaran kontrolon de la pireneaj glaĉeroj. Ĝia lasta raporto konfirmas ilian diseriĝon, observatan dum 18 jaroj da mezuroj en la montaro. En 1850 la monta ĉeno enkalkulis centon da ili, dissemitaj en Hispanio kaj Francio. Komence de la 20a jarcento restis nur 44.

Hodiaŭ ilia nombro falis ĝis 23. Laŭmezure de tiu sensacia regreso la pireneaj glaĉeroj perdis 90%-n el sia areo, kontraŭ 50% la alpaj, precizigas la raporto. «En Pireneoj, kies pintoj kulminas je iom pli ol 3000 metroj, la glaĉeroj situas en zono lime de siaj ekzistokondiĉoj, kio igas ilin aparte sensivaj al plej etaj klimataj variadoj, klarigas Pierre René. Sufiĉas, ke la temperaturo varias je kelkaj dekonoj da gradoj, por renversiĝo tiel ke la montaro perdas sian kapablon konservi daŭran neĝon kaj favorajn kondiĉojn por persisteco de glaĉeroj.» Sed la temperaturo plivarmiĝis je 1,2°C dum sesdek jaroj ĉe la montaro laŭ OPCC, Observatoire Pyrénéen du Changement Climatique (Pirenea ofico por observi la Klimatoŝanĝon).

Inter la plej famaj glaĉeroj jam malaperintaj enlistiĝas tiu ĉe la breĉo de Rolando. En tiu situo, kies elvoko lulis generaciojn da lernantoj, la malaperintan ŝtuparon el glacio, kiu kondukis al la kresto, anstataŭas roka krutaĵo, kiu malfaciligas ĝian aliron.

Rilate la alpajn glaĉerojn, kvankam ili pli bone rezistas al klimata plivarmiĝo, ankaŭ ilia ekzisto ne plu longe daŭros. Laŭ studo lastjare publikigita de svisaj esploristoj en la revuo *The Cryosphere*, depende de la diversaj scenaroj pri evoluo de koncentriteco de la forcejaj gasoj, inter du trionoj kaj 90% de la alpaj glaĉeroj povas esti malaperintaj antaŭ 2100.

El la kvinopa Cenona tradukrondo

Claudine, Martine, Monique, André, Marcelo

Artikolo de Marie-Amélie Carpio publikigita la 3an de julio 2020 kaj aktualigita la 20an de majo 2021. El la retejo:

<https://www.nationalgeographic.fr/environnement/2020/07/les-glaciers-des-pyrenees-pourraient-disparaitre-avant-2050>



Por trovi la plej bonan lokon en la hejmo, serĉu la katon !



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collège. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46). **La kursoj estas portempe neokazantaj.**
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

LA ARBARA STRIGO

Latina nomo: Strix aluco

Ordeno: Strigiformaj

Familio: strigedoj

Grandeĉo: 39 cm

Enverguro: 94 ĝis 104 cm

Pezo: de 420 ĝis 590 g

Vivdaŭro: 18 jaroj

Loĝregionoj: de la boreala ĝis la mediteranea, mildvetera Eŭrazio

Loĝlokoj: arbaroj, tombejoj, ĝardenoj kun malnovaj altaj arboj kaj eĉ foje en domoj.



La trajtoj de la arbara strigo

Jen kapo de rusa pupo kun grandaj nigraj okuloj, jen pluŝaj rondaj formoj, jen pluma kamufila vesto. La arbara strigo unuavide ne aspektas kiel murdisto. Tamen kia ĉasisto! Apenaŭ post la sunsubiro, gvate sur branĉo, la arbara strigo vekas ĉiujn siajn sensojn.

Naturo dotis ĝin per eksterordinaraj kapabloj:

Ĝia fleksebla kolo ebligas turni la kapon je 270°.

Ĝiaj okuloj, fronte lokitaj, ebligas duokulan vidon kaj maksimumigas la noktan lumon. Tiel ĝi vidas, eĉ kiam nokte lumas nur luno kaj steloj.

La plumokronoj ĉirkaŭantaj la okulojn direktas la sonojn al ĝiaj oreloj.

Ĝia aŭdkapablo ebligas al ĝi percepti plej etajn movojn de eventuala predo sur la grundo.

Silenta, ĝi kapablas surprize alflugi sur predon, ĉar ĝiaj flugiloj estas mallongaj kaj larĝaj, perfekte adekvataj por flugi inter branĉoj. Ilin kovras velurecaj plumoj, kiuj malpliigas la flugbruojn.

Tiel ĉiunokte la arbara strigo frandas arvikolojn (kampomusojn), sorikojn (longmuzelajn musojn), paserojn sed ankaŭ kolombojn aŭ kuniklidojn. Ĝi volonte glutas ankaŭ ranojn, reptiliojn, helikojn, noktajn papiliojn kaj majskarabojn. Foje ĝi fiŝkaptas. Ĝiaj ĉaskaptoj alternas kun kriadoj. Al la virstriga ululo respondas la strigino per akutaj "ki uik!", interkomunikado, kiun la paro uzadas vivdaŭre, ĉar la arbaraj strigoj estas fidelaj partneroj.

Pro siaj dumnoktaj kutimoj, tiu rabobirdo ofte restas nevidebla, tial ke dumtage ĝi dormemas, kaŝite en foliaroj, for de la homaj rigardoj kaj de la birdoj emaj ĝin ĝenadi: pegoj, garoloj, korvoj... Nur piede de arboj regurgitadobuloj atestas pri ĝia ĉeesto. Tamen foje eblas vidi ĝin sunbani sin!

Sed aŭtune, komence de amorperiodo, la arbara strigo plej videble montriĝas. Tiam ĝi serĉas ejon por nesti: arbo-, mur- aŭ ter-kavo, subtegmentejo aŭ forlasita nesto de sciuro. La strigino demetas en februaro-marto de du ĝis sep blankajn ovojn. Dudek tagojn poste eloviĝos lanugokovritaj idoj rondaj kiel bulkvastoj. Tiuj bestoj restos fidelaj al sia teritorio, se ĝi abundas je malnovaj arboj kun hedero kaj ronguloj, se ĝi restas trankvila kaj senpesticida. La arbaraj strigoj estas utilaj kaj amindaj. Kompreneble ĝardenistoj interese favoru ilian ĉeeston.

Tradukis Marcelo el retejo Rustica:

<https://www.rustica.fr/animaux-jardin/chouette-hulotte>



Irvojo al apetita libereco¹

Frans-Alexandre Torreele



Jen ja magio, pensas la liveristo, *ĉiam ie, kien iri*. Irceloj al li certe ne mankis en la vivo, sed neniu prezentiĝis tiel oportune kiel nun. Antaŭe li devis mem fiksi por si punktojn sur horizonto, surmeti ne tro fuŝitajn ŝuojn, kaj konvinki sin, ke ĝuste tien li devas iri. Paŝu aŭ mortaĉu, estas ne nur vortfiguro por iuj: foje, pli ol alveni ie, gravas pafi sin for de kie oni estas. La tagon, kiam oni rakontis al la liveristo, ke la fiŝoj devas neniam ĉesi naĝi, se ne, ili dronas, li komencis ŝpari por tatuigi unu, unu dikan ezokon sur sia bicepso. Kiel ezoko li eniris irvojon ne demandante sin, ĉu la bonan, li voradis kilometrojn, ne pripensante, nepre ne. Li simple foriris, foriris al urbo, al alia lando, al alia kontinento, foriris antaŭ tagiĝo, antaŭ polico, malfidante tiujn kiuj restas, tiujn kiuj ne ŝatas preterpasantojn. Irinte pli for, ankoraŭ nur iomete pli for.

Koncerne ircelojn, la liveristo nun satiĝas. Lia poŝtelefono vibras kaj li malkovras sur la ekrano la du adresojn: tiu de la gastejo, kie kapti la manĝaĵon, kaj tiu de la ulo alliverota.

Jen ekvibras. 21-minutan liveradon, 2,49 eŭroj. Li ekrajdas sian biciklon, sian rustoplenan *Rockrider* surkaje forpruntitan, kaj li aktivigas siajn femurojn. Liaj femuroj, tiel masivaj, ke li neniam povis surmeti ĝinzon sen la impresu kunpremi sian femuran arterion. Liaj propraj malgrandaj baobaboj, kiuj plurfoje eldornejigis lin, kiam necesis forkuri tra arbaroj, persekutite de la bruoj de batalbotoj en la velkaj folioj, krunĉ, krunĉ, krunĉ, simile al makzelo, kiu viadorse voretas la universon, aŭ ankaŭ kiam necesis tiri tiun boaton plenplenan je homoj, kiuj vomis siajn tripojn, tiri ĝin kun akvo ĝis femuroj kaj kun unu demando en kapo: kiu irvojo poste?

¹ originala teksto: <https://short-edition.com/fr/oeuvre/tres-tres-court/le-gout-de-la-liberte>

Kompare hodiaŭ jen paradizo, kaj en tiu paradizo, sankta GPS instaligās dekstre de Dio. Neniam plu vi perdiĝos, filo mia, ĉar male al la Diaj vojoj, la bicikleblaj vojoj estas tute sekveblaj.

Larĝa posta ĉenrado, bulvarado, suno kiu alfalas sur horizonton, ruĝiĝas ŝoseo kvazaŭ magma rivero, stirilmovo dekstren, maldekstren, kaj, laŭ la ritmo de la tago kiu mallumiĝas kaj bluiĝas, la liveristo pedalas sur la mortanta fajro. Li rapidas, preterveturas ulinojn en someraj roboj kaj ulojn, kiuj pavas sur elektraj skutiloj, trioje starante, fumas kanabaĵon kaj mortas ĉe stratanguloj. Ne timas li la urbon, ĝin trarajdas li, pensante pri ĉio kaj nenio kaj eĉ foje pri ambaŭ samtempe. Tiel estas la irvojo, penso, kiu malvolviĝas sur bitumo, sur gudro, kvazaŭ bendo el celulozo, kaj enkape ĉiujn filmojn el projekciejo, irvojo estas digestataj spaco kaj tempo. La lastaj sunradioj sablokoloro refarbas la fasadojn kaj transportas lin mezen de dunoj, ŝanceliĝantan sur la postpordo de kamioneto *Toyota*. Ili tro grandnombras, por ke ĉiuj povu kunstari sur la plataĵo de la veturilo. La pado estas skua.

Li riskas esti elĵetata je ĉiu sekundo, kaj abundas sekundoj en senpaŭza naŭhora vojaĝo. Sub akra rigardo de viroj, virinoj provas kvietigi la ploradon de l' geknaboj, ili provas tiel forte, ke ili preskaŭ sufokas ilin. Jen homaro kuniĝinta en soifo kaj timo kaj admoniaka fetoro de pisaĵo. Pensas li, se mi cedas, tuja falo. De tiam li ne ĉesis pensi: se mi cedas, tuja falo. Kaj li alkroĉiĝas.

Tio ĉi revenas en lian kapon pli forte ol la *Twingo*-aŭtopordo perkutita antaŭ du monatoj. La irvojo, nur karamboloj. Pri la pensoj, ne estas GPS. Noktiĝas, kaj tiam revenas la malvarmo de noktoj pasigitaj borde de rapidvojo, la unuajn monatojn sub kabano, (ŝimitaj ŝarĝplataĵoj, truita blua tolaĵo, plastaj sakoj *Auchan* kaj kartonaĵoj sur grundo), poste sub oranĝa kaj ruĝa tendeto, malgranda inkandeska punkto en griza suburbo. Tio ĉi pelmele revenas, kiam li pedalas. La irvojo estas arto pri fuĝantaj spacoj kaj revenanta tempo.

La GPS diras «Alveninte». Li sonorigas ĉe pordo kaj atendas. Atendas kvin minutojn plu sur la trotuaro, kun papersaketo enmane, diskaj grasmakuloj kreskantaj sur la bruna papero. Regalas lin grasodoro kaj refortiĝo. Li pensas, ke estus domaĝe lasi nutraĵon difektiĝi, kaj ke eble li povas paŭzi. Li eltiras la burgeron el la saketo. La fandiĝinta Ĉedaro algluiĝas al la celuloido. Li mordas en la mola pano. La graso kaj la sukero de la saŭco ruliĝas sub lia palato, kaj la acideco de la pikloj spronas lian langon, kaj la rostita, hakita, preskaŭ antaŭmaĉita viando glitas en lin. Li suspiras kaj rigardas la mondon ĉirkaŭ si. Li finas maĉi kaj viŝas siajn grasplenajn fingrojn kontraŭ sia pantalono kaj li rerajdas sian rustoplenan *Rockrider*. Li plu sekvas la irvojon.

Lundaj rendevuoj - printempo 2022

novelo tradukita de la Cenona tradukrondo (*Martine, Monique, Klodin', André kaj Marcelo*)

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

